
Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro

# Festivala Kuriero

26-a de septembro 2020, numero 19
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## La Printempa Inaŭguro markos la lastan oficialan tagon de MondaFest' 2020



La 20-a de septembro 2020 estis la lasta oficiala tago de la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020), en kiu okazis la Printempa Inaŭguro. MondaFest' 2020 celis omaĝi du festajn sezonojn: Someron kaj Printempon. La Somera Inaŭguro markis la unuan oficialan tagon de la festivalo kaj omaĝis la komenciĝon de somero en la



norda hemisfero. La Printempa Inaŭguro markis la lastan oficialan tagon de la Festivalo kaj omaĝis la komenciĝon de printempo en la suda hemisfero. Tial MondaFest' 2020 kun espero rigardas nian planedon, per inspiriĝo je sezonoj de varmo kaj florado, kaj per du inaŭguroj tenos dinamika kaj konstanta la agadon por Esperanto kaj por la kulturo de paco kaj diverseco en nia mondo.

Vi povas spekti la Printempan Inaŭguron ĉe: https://mallonge.net/6y


En la programo de la Printempa Inaŭguro la publiko ĝuis belan kaj profundan omaĝon al Júlia Sigmond kaj Sen Rodin, la lanĉojn de la Internacia Novelo-Konkurso (INK) kaj de la kampanjo por Tutmonda Arbo-plantado, raporton pri la festivala temo fare de Humphrey Tonkin, paroladojn de niaj ĉefgvidantoj en ILEI, TEJO kaj UEA kaj multe pli.

Trovu kalejdoskopon de la Inaŭguro en la paĝo 4.

Detalan artikolon pri ĝi vi baldaŭ povos legi en la novembra numero de la revuo *Esperanto*.



## Esperanto kaj Scienco



Esperantujo estas plena je sciencemuloj! 12 esperantistoj rakontas pri siaj fakoj (astrofiziko, molekula medicino, robotiko, kaj pluraj aliaj).


**KAEST2020, la Reta Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (1-4 de oktobro 2020): https://kaest.ikso.net/2020.**

**Scivolemo – Sciencaj videoj en Esperanto: https://www.youtube.com/c/Scivolemo.**

https://www.facebook.com/esperantorevuo
**Sekvu la revuon *Esperanto* kaj la Retan Revuon**
https://twitter.com/revuo_esperanto

# Mesaĝo de la prezidanto de ILEI okaze de 21-a de septembro: Tutmonda Tago de la Paco

Mireille Grosjean




Ni uzu tiun Tagon por pripensi pri nia vivo, nia agado, nia laboro, nia nutrado, provante trovi la plej bonajn solvojn por ni mem, nia familio, nia vilaĝo aŭ kvartalo. Ni uzu tiun Tagon por iri al konatulo aŭ parenco kaj diskuti provante solvi malnovajn konflikton kaj retrovi serenecon, atingi pacon. Ni uzu tiun Tagon por paroli pri respekto kaj solidareco okaze de nia instruado; tekstoj pri tiaj temoj ne mankas.

26-an de septembro: Tutmonda Tago por elimini la nukleajn armilojn.

Tiu paŝo nepras, tamen la registaroj de la mondo ne ankoraŭ atingis tiun etapon. En 2020 ni memoras pri la du atombombadoj en Japanio, ĉar 75 jaroj situas inter tiuj teruraj tagoj kaj nia nuna jaro. Vidu https://youtu.be/mZXUzU4nl_M.

En oktobro 2019 marŝado por Paco komenciĝis en Barato kun celo Ĝenevo, Svislando, eŭropa sidejo de UN, por memori pri la senperfortaj luktoj de Gandhi. Jaï Jagat, Ekta Pariŝad. Tamen pro la pandemio la manifestacio devis halti en Erevan, Armenio, en marto 2020. Tra Francio nun marŝas diversaj grupoj, kiuj alvenos al Ĝenevo la 25-an de septembro sur la Placo de Nacioj antaŭ la UN-domaro. Tiaj paŝadoj ebligas longajn pripensojn solulajn, kaj ankaŭ paroladon kun la kunpaŝantoj. Manifestaciantoj forlasas sian kutiman vivon kaj komune iras kuraĝe antaŭen al simbola celo por esprimi sian opinion kaj impresi la decidantojn. Se en via lando vi havas la eblon manifestacii surstrate, vi estas feliĉaj. Se ne, ni pensu pri tiuj popoloj, al kiuj mankas tia eblo esprimi sin.

Kion ni povas fari por la Paco kadre de nia instruado? Kion ni volas fari? Kion ni pretas fari? Ni ĉiuj havas tiun elekton, ni ĉiuj devas decidi pri niaj faroj kaj niaj diroj. Ni estu kuraĝaj ekzemploj per pozitivaj kaj respektoplenaj paŝoj al plena feliĉo kaj progreso por niaj lernantoj.

## Gazetara Komuniko de UEA n-ro 909.

# Interkultura Novelo-Konkurso (INK), de Akademio Literatura de Esperanto, sub aŭspicio de UEA

Dum la solena fermo, envere la Printempa Inaŭguro de la Monda Festivalo de Esperanto, okazis la lanĉo de Interkultura Novelo-konkurso (INK). Konceptita laŭ iniciato de kanadaj esperantistoj, la LKK de la Universala Kongreso en Montrealo kaj la Esperanto Societo Kebekia (ESK), INK estas organizata de Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kun subteno de la Komisiono pri Belartaj Konkursoj. La konkurso celas instigi aktualan novelan kreadon de aŭtoroj el divers! aj kultur oj pri la temo "KOVIM-19: Kiel ĝi ŝanĝis nin" - sama temo, malsamaj vidpunktoj, malsamaj historioj.

La temo de la konkurso estis elektita post reta publika voĉdonado organizata de la montreala LKK antaŭ la Virtuala Kongreso. La prezenton de la konkurso kaj ties regularon oni povas trovi ĉe la retejo de ALE per akademio-literatura.org/ink aŭ mallonge.net/INK.

La teksto-proponoj devas havi maksimume 12 000 karaktrojn (proksimume 6 paĝoj). Ne estas minimuma longeco. Aŭtoroj povas sendi proponojn ĝis la 20-a de junio 2021 (sama tago, kiu markis la inaŭguron de MondaFest' 2020) per specifa sendo-formularo de la konkurso, trovebla ĉe ALE: akademio-literatura.org/ink/sendoformularo. Proponoj devas nepre esti en Esperanto, neniam antaŭe publikigitaj, tamen ne nepre originale verkitaj en Esperanto: tradukaĵoj el aliaj lingvoj bonvenas, kio faras el INK interesan ilon por informi pri Esperanto al neesperantistaj verkistoj.

Interkultura ĵurio taksos la novelojn. La gajnintoj estos anoncitaj dum la 107-a Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio en Montrealo, en 2022. La 1-a, 2-a kaj 3-a premioj estos respektive 500, 300 kaj 200 eŭroj. La prezenton de la konkurso dum la Printempa Inaŭguro, kiu kalkulis je speciala interveno de D-ro José Antonio Vergara el Ĉilio, oni povas respekti ĉi tie: youtu.be/8g1w_xEdZVU?t=6661.




Abonantoj jam povas elŝuti la oktobran numeron de la revuo “Esperanto”. La papera versio baldaŭ estos dissendita: *https://uea.org/revuoj*

195 | Malferme: La redakcio intervjuis Bertilo Wennergren, ĉi-jaran premiiton de la fondaĵo Grabowski.
196 | UEA invitas prelegi en la 74-a IKU-sesio en Belfasto
197 | Atendante la venontjaran Italan Kongreson… Eblas almenaŭ gustumi ĝin!
198 | Afriko brilas: Vizitoj de kluboj de Esperanto kaj/aŭ geesperantistoj
199 | MondaFest’: La plej tutmonda IJK, en la reto
200 | La Tago de Ameriko
202 | Societo Zamenhof, 6 septembro 2020
203 | “Grandioza tag’» kantis Kajto. Ja, tia tag’ por Eŭropo
204 | La 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj
205 | MONAT – Virtuala MezOrienta Nordafrika Tago kadre de MondaFest’ 2020
206 | Belartaj Konkursoj
207 | Planeda pripenso
208 | Interkultura Novelo-Konkurso
209 | Virtuala Kongreso: Giuliano Turone intervjuita de Humphrey Tonkin pri Homaj Rajtoj kaj Unuiĝintaj Nacioj
210 | Fake, Science kaj Profesie tra la mondo
211 | Laste Aperis
212 | La 6-a Esperanto-staĝo en Métabief
213 | Recenzo: BLK
214 | Oficiala Informilo
214 | Historio: Geedziĝdato de Júlia Sigmond kaj Sen Rodin
215 | Forpasoj

## “Sen Timo”

"Sen Timo" estus kontribuo de Kajto al la Festivalo por la Paco de Unesko. La festivalo ne okazis, tamen "Sen timo" fariĝis manifesto, kiu lanciĝis ĉirkaŭ la 21-a de septembro, Tago de Paco!




Frukto de internacia kunlaboro inter esperantistaj artistoj, "Sen Timo" aŭskulteblas ĉe You Tube. La manifeston vi povas helpi per traduko en vian lingvon de la frazo "En paco ludi – sen timo kuregi, salti, danci kaj kanti... estas rajto de ĉiu infano!!!". La tradukon oni devas sendi al Ankie kaj Nanne, de Kajto:
https://www.youtube.com/watch?v=oleyMmMYyOM

**Vi povas esti aŭtoro de la Festivala Kuriero kaj la Reta Revuo!**
**Por kontribui, skribu al la redakcio redakcio@revuoesperanto.org**

Ĉe la fino de la 2020-a jarkolekto, revuo *Kontakto* eldonos sian 300-an numeron! Por celebri tiun okazaĵon ni kolektas fotojn kaj videojn pri la plej ŝatata numero de niaj legantoj.

Ekde kiam vi abonas *Kontakto*? Kiu estas via plej ŝatata numero? Cu eble iu, en kiu aperis via propra kontribuaĵo? Ni scivolas!
Ni volas vidi fotojn! Ni elektos kelkajn por aperigo en tiu 300-a numero.
kontakto@tejo.org

En tiu ĉi foto videblas pluraj eldonoj de Kontakto el la jaroj 2005-2009 sur T-ĉemizo de la revuo.



# La Printempa Inaŭguro kalejdoskope

La Somera Inaŭguro markis la unuan oficialan tagon de la MondaFest' kaj omaĝis la komenciĝon de somero en la norda hemisfero. La Printempa Inaŭguro markos la lastan oficialan tagon de la Festivalo kaj omaĝos la komenciĝon de printempo en la suda hemisfero.




Carlo Minnaja

Omaĝo al Júlia Sigmond kaj Sen Rodin




Alta Tajdo

Muzikainterludo




Michela Lipari

Omaĝo al Júlia Sigmond kaj Sen Rodin



José Antonio Vergara

Lanĉo de la Internacia Novelo-Konkurso (INK)



Sara Spanò

Omaĝo al Júlia Sigmond kaj Sen Rodin



Normand Fleury

Lanĉo de la kampanjo Tutmonda Arbo-plantado



Spomenka Štimec

Omaĝo al Júlia Sigmond kaj Sen Rodin



Duncan Charters

Ferma parolo